

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LÁSZLO ZINNER

JARABONO

BRAZILIO — Cr\$ 15,00

Eksterlande — Cr\$ 30,00

Aŭ 25 Respondokuponoj

RIO DE JANEIRO, NOVEMBRO, 1947

JARO I

Monata eldono

N.º 8

Redakcio kaj Administrejo
R. das Marrecas, 19, 2.º and.
Tel.: 22-5300 — C. P. 3677
Ekzemplero — Kr\$ 1,00

KONGRESPROPONJOJ

“Konsiderante, ke ĉiujara konvencio de esperantistoj pristudontaj la regionajn problemojn de la Esp-propagando kaj Esp-organizado estus tre fruktodona por nia Movado, kaj eĉ ŝparus multege da klopodoj al la organizantoj de la brazilaj esperantaj kongresoj, al kiuj tiuj konvencioj liverus, jam prilaboritaj, multajn sugestojn kaj informojn pri la bezonoj de la koncernaj regionoj, rilate al niaj idealaj celoj,

LA KONGRESO PROPONAS

al la Esp-grupoj de tuta Brazilo, ke ili okazigu, unufojn ĉiujare, en sia ŝtato, (ŝanĝante kiel eble plej la urbon) konferencon aŭ konvencion ekzamenontan la regionajn problemojn de nia movado, laŭpove interkonsente kun Brazilo Ligo Esperantista”.

S. Paulo, 19-9-1947a.

(subs.) *Roberto das Neves.*

Boris Eston.

Luiz de Azevedo Coutinho.

Wilson Veado.


Ismael Gomes Braga.

Oswaldo Leite de Morais.

* * *

“La subskribantoj,

Konsiderante, ke la kantado ne nur plezurigas la esperantajn kunsidojn, ekskursojn, festojn k.t.p., sed estas bona ilo por la praktiko, propagando kaj disvastigo de nia kara helplingvo,



Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, laborante kune; kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo.

(ZAMENHOF)

Proponas

1-e) Ke oni klopodu enkonduki la kutimon kanti je la klubaj kunsidoj;

2-e) Ke oni klopodu helpi la verkadon de KANTARO POR BRAZILAJ E-KLUBOJ, sendante al Brazilo Ligo Esperantista,

tipajn naciajn kantojn, kiujn oni tradukos en Esperanton.”

S. Paulo, 19-9-47.

(subs.) *Giovani P. Faraco.*

Ismael Gomes Braga.

A. Cactano Coutinho.

Oswaldo Leite de Morais.

F. Doblaz Filho.

Délio Pereira de Souza.

O. S. Lopes.

Wilson Veado.

* * *

“Konsiderante la streĉajn klopodojn de la esperanta gazetaro, nome O BRASIL ESPERANTISTA, S. PAULO ESPERANTISTA, RIO ESPERANTISTA, NOVA SENTO kaj MONTARA BULTERO, kiuj portas al ĉiuj partoj de Brazilo la semon de niaj idealoj:

ni proponas ke:

La Kongreso aprobu varman laŭdon al ties eldonantoj, kaj ke ĝi rekomendu al ĉiuj esperantistoj, ke ili helpu, kiel eble plej, tiujn gazetojn, por ke ili povu daŭrigi sian fruktodonan propagandon por Esperanto.”

S. Paulo, 18an de Septembro 1947a.

(subs.) *Roberto das Neves.*

Luiz de Azevedo Coutinho.

Wilson Veado.

Ismael Gomes Braga.

EN SIMIOLANDO

(Fablo montranta la veran signifon de l' misio de Jesuo Nazareta)

Verkis: GLORIA CRAWFORD

Esperantigis: D. PEREIRA DE SOUZA

Estis en pratempoj en regiono de profundega arbaro, kolonio de simioj, kiuj neniam interrilatis kun iu ajn homo. Ili estis pli saĝaj ol aliaj estaĵoj tie vivantaj. Kunvenis ili sub la palmarboj, paŝis piedstare, distriĝis per kurado tra la arboj, kaj estis mire rigardataj de aliaj bestoj pro ilia pligranda forto kaj inteligento. Feliĉaj kaj kontentaj ili vivadis. Neniam ili pensis, ke la vivo povus esti malsama, tiel ili deziris nenion alian ol ilian vivmanieron.

Tamen, en alia lando de l' tero, nekonata de ili, estis kolonio de homoj, kaj, inter tiuj, estis unu karaktere kompatema kaj amema. Li sciis pri la ekzisto de tiaj estaĵoj, pri ilia vivmaniero, kaj pri ilia kruda feliĉo. Li komprenis iliajn eblecojn, kaj lian superecon kontraŭ ili, pro lia pligranda sperto kaj klereco; kaj ĉar li ĉeestis la amspirito, li kompatis ilian blindan malklerecon kaj diris al si mem: "Mi deziras ke ili ĝuu la ĝojon esti homoj".

Tiamaniere pensante kaj aŭdinte ke la homa regno baldaŭ fariĝos tie, sed nevolante ke ili sin sentos fremdaj kaj malfeliĉaj en la nova vivmaniero aperonta inter ili, li faris grandan decidon. Li nur povus fari tion pro lia profunda amo, kiu postulis de li grandan sinoferon. Li diris al si mem: "Mi vivados kiel simio inter tiuj estaĵoj, kaj mi parolos al ili pri la mirindaĵoj de la homa regno; mi instruos ilin tiamaniere, ke ili sin pretigu por partopreni ĝian ĝojon.

Tiam li sin vestis kiel simio, disigiĝis de ĉiuj, kiujn li amis, kaj ekmarŝis al la simiolando, kie li enloĝiĝis kiel eble plej simple, kaj pensis: "Mi venis por instruo, kaj ne por lerno".

Lia ĉeesto tuj vokis la atenton kaj la intereson de liaj novaj kunvivantoj. Kvankam li ne fanfaronis, oni rimarkis tuj lian grandan scion, kaj liaj multaj faritaĵoj igis ilin miregitaĵoj kaj teruritaĵoj. Li estis tre bonfarema kaj afabla, sed li parolis kiel aŭtoritatulo. Li ne kritikis ilin, memorante ke li ne estis inter ili por kondamni ilian mondon, sed nur por ilin konduki al pli kompleta esprimado kaj komprenigo pli profunda je altvalora vivado. Tagon post tago, li pacience instruis ilin. Multaj el la simioj kuniĝis ĉirkaŭ li, aŭdante sciemaĵoj, sed ne estante kapablaj kompreni, ili mokis lin. Li estis tre humila, kaj ne sentis sin ofendita, pardonante la ofendojn, ĉar ili ne scias kion ili faras, kaj ne havas la kapablon kompreni lian celon inter ili. Fine, li sukcesis varbi areton da sekvantoj, al kiuj li instruis precipe pri aferoj rilate la admirindan regnon de l' homoj, el kie li venis, kaj kien ili sin direktis, kaj igrigis ilin instrui tion al iliaj samspeculoj.

Li diris al ili: "Al vi estas eble koni la misterojn de la regno

homa, ĉar vi estas sufiĉe instruitaj por kompreni tion, kion mi diras, sed al ili ankoraŭ ne estas eble. En la regno pri kiu mi parolas, la popolo kulturas lignon kaj per ĝi konstruas domojn por loĝi; ĝi semas grajnoj por ĝia nutrado kaj enmagazenigas ilin; ĝi konstruas grandajn ŝipojn por veturigi ĝin sur la maro; estas kuracistoj por kuraci la malsanulojn; ĝi vivas ĝoje kaj komforte, legas kaj skribas, kantas kaj dancas; ĝi posedas mirindaĵajn muzikilojn; kaj esprimas sin per literaturo, arto kaj kantado. Ne povas eniri en la menson de simio la koncepto pri la mirindaĵoj atentantaj ĝin en la homa regno.

Tie oni povas komunikiĝi tra grandaj distancoj, kaj voĉo estas aŭdata, transsendita ĝis centoj da mejloj, per malgranda ilo elpensita de homo, kaj nomata: telefono."

Lia instruo ŝajne estis tute senutila, ĉar ili ne povis kompreni la signifon de la vortoj semi kaj konstrui, danci kaj kanti, kaj kiam la instruanto provis, komprenigi ilin pri la signifo de arto kaj literaturo, kaj preparolis detale pri domo, ŝipo kaj telefono, ili gape lin rigardadis. Fine li diris al ili: "Vi bezonas iĝi simioj. Vi naskiĝos denove. Vi forgesos viajn antaŭajn pensojn kaj akiros novan konscion. Vi estos instruitaj pri la regno. Vi devas vin rebonigi — aliigi. La vilo kaj la vosto ne povas eniri en la homan regnon. Se vi perdos vian vivon pro amo al mi, vi ĝin trovos. Se vi serĉos unue tiun regnon, pri kiu mi parolas, ĉio, kion vi deziras nun estos aldonata al vi kaj via bonaĵo kreskos centoble."

Ili restis kvazaŭ stultaj. Ili ne sciis kion signifas esti iliaj bonaĵoj aldonitaj centoble; kaj kiam li diris al ili, ke ili devus forgesi siajn antikvajn kunvivantojn, kaj forlasi siajn gepatrojn, kaj ĉion, kion ili posedis pro la nova regno, ili intencis disŝiri lin per siaj manoj, sed li ĉiam sin ŝirmis kontraŭ la atakoj, kiun ili preparis al li.

Unu tagon li diris al areto da simioj, kiu lin sekvis: "Kelkaj el vi ne mortos, dume vi ne vidos la homon eniri en sian regnon". Tiel, post tri tagoj, li prenis tri el ili kaj kondukis ilin al malproksima loko; kaj kiam ili estis solaj, li demetis sian felvestaĵon, kaj montris al ili sian blankan kaj admirindan homkorpon. Ili restis surprizaj kaj ektimaj, sed li rekomendis ke ili ne rakontu al aliaj simioj tion, kion ili vidis,

Tiam, multaj, pro envio, penis murdi lin, kvankam aliaj deziris fariĝi lin la Simiestro, pro lia granda povo. Sed li skuis la kapon laŭ diris: "Vi ne komprenas. Mia regno ne estas de ĉi tiu mondo. Mi venis de homa regno, kaj mi devas reiri tien. Mi volas ke vi partoprenu je ĝiaj ĝojoj. Se vi min amas, gardu miajn instruojn kaj sekvu min."

Fine, la simiestro reganta tiom koleriĝis pro envio, ke li decidis detrui tiun entrudulon, kaj penis per ĉiuj rimedoj kapti lin. La homo suferis pacience ĉiujn persekutojn.

"Mi pardonas ĉiujn", li diris, "ĉar vi ne komprenas. Iam vi scios ĉion, kion mi faris por vi. Vi ne min elektis, sed mi elektis vin. Multaj el vi ŝanĝiĝos, ĉar mi venis al vi, kaj tiuj povos ĝui la feston de la homa regno, kaj havos geedziĝajn vestojn."

Ĉiuj, krom kelkaj liaj sekvantoj, ribeliĝis kontraŭ li, prenis kaj ekjetis lin en la riveron sed li subakviĝis, foriris kaj, forlante siajn ledvestojn, alvenis al alia bordo, kaj sin direktis al sia naskolando.

Tiuj, kiuj aŭdadis lian instruadon, estis devigataj kaŝiĝi, kaj instrui sekrete.

La simioj daŭre naskiĝis kaj mortis, sed la instruoj de tiu Granda Simio, vivinta inter ili influadis sur ĉiujn iliajn pensojn, kaj kaŭzis grandan malkonsenton al kelkaj kaj grandan pacon kaj feliĉon al aliaj. Multaj penis vivi kiel li, kaj iom post iom aliĝis mense kaj korpe, akirinte novaĵn kapablojn, sed la plimulto restis indiferenta kaj daŭrigis siajn antikvajn kutimojn.

Fine, venis la tempo, kiam estis okazonta la festo de la homa regno; tiam kvazaŭ defalis skvamoj el iliaj okuloj. Ili povis rigardi tre malproksimen kaj rimarkis ke iliaj arbaroj ne konsistigas la tutan teron, ĉar estis aliaj pluaĵaj partoj. Ili vidis strangajn estaĵojn novajn, kun la korpo kovrita per vestoj. Ili vidis grandajn urbojn kaj ŝipojn, vaportraĵojn, aĵojn, kiujn ili ne povis nomi, nek kompreni, sed apenaŭ rigardadis kun granda miro kaj ektimo.

Multaj el tiuj, kiuj penis vivadi laŭ la instruoj de la Saga Simio, komprenis kaj subite ŝanĝiĝis per la nova mensa, disvolvigaanta en ili, ĉar lomo pli hela ol tiu de leviganta suno ŝajne brilis interne de ili. Tiuj iris renkonte al la civitanoj de la homa regno, laŭmezure ke ili alproksimiĝis de l' patro de la

simioj. Vidante inter tiuj, kiuj ĵus alvenis la Grandulon, kiu la boris por ili tiom pacience kaj neprofiteme, ili falis surgenue, amege, kantante laŭdajn kaj dankajn kantojn, pro la admirinda donaco de nova menso kaj nova korpo, kiujn ili ricevis. Ili vidis tiam, ke, inter ĉiuj el la homa regno, ilia Amiko estis la plej amata, ĉar li estis aminta pli ol la aliaj, forlasinte la grandajn riĉaĵojn de sia regno, kaj suferinte malgloron, honton, kaj malmaltiĝon, kiujn la nesciantaj simioj trudis al li.

Simio, kiu havis kelkan intereson pri la instruoj de l' Klera Simio, sed ne forlasis sian simian agmanieron, ekiris ankaŭ por ilin renkonti, intime decidita partopreni la feston, preparitan por ili. Kiam ĉio estis preta, ĝi eniris kaj altabliĝis, sed ĝi restis maltrankvila kaj ne sentis sin feliĉa. Fine, la Amanta Homo, kiu instruis ilin, alproksimiĝis al ĝi, kaj diris per simia parolmaniero: "Amiko, kiel vi alvenis ĉi tien, kiam vi ne havas la geedziĝan veston?"

Ĝi ne povis respondi. Ĝi perceptis, per la voĉo, ke Tiu estis la vivinta inter ili kiel simio, kaj tuj komprenis, ke la geedziĝa vesto estis la nova korpo. Ĝi konsciis pri la malbeleco de sia vila eksterajo, de sia longa vosto, kaj de siaj maldelikataj manoj. Tremanta pro teruro, kaj hontanta pro nehaveco de la vesto, ĝi foriĝis de inter tiuj novaj estaĵoj, belaj kaj strangaj, kaj, kun sovaĝa ekkrio, ĝi reiris al la simiaro. Tie, kun la plej granda malĝojo, ĝi ploregis amare, kaj grincis per la dentoj, malaperinte inter tiuj starantaj sub la palmarbo.

"Tiu, kiu havas orelojn por aŭdi, aŭdu", diris Jesuo.

Angla lernejo serĉas kontakton kun Sud-Ameriko

Ni ricevis la jenan leteron de s-ro D-ro C. Sass, el Anglujo:

"Koran dankon por viaj gazetoj, la tri ekzempleroj de "Rio Esperantista", kiuj ege plaĉas al ni. Ni metis ilin en nian bibliotekon, por la uzado de la esperantista legantaro.

Nun, mi petas vian helpon por interrilatigi la infanojn de nia lernejo kun infanoj el la sudamerika kontinento, kiuj lernas Esperanton kaj ankaŭ ŝatus korespondi kun anglaj gelnantoj de nia lernejo. Ni havas nun proksimume 40 gelnantojn, kiuj deziras tian korespondadon. Mi estus dankema se vi povus interrilatigi ilin kun infanoj de aliaj amerikaj landoj. Tiamaniere mi estas certa, ke la intereso por nia lingvo multege kreskos."

Adreso: The Grammar School, Hemsworth, N. r. Pontefract, Yorks, Anglujo.

Penseroj...

Kunporti ĝis la fino, sen plendo, la ŝarĝon kiu pezas sur ni, estas la plej bona maniero igi ĝin pli malpeza.

Pindaro

* * *

Riĉeco, altaj postenoj kaj honoraĵoj ne sufiĉas por ke iu viro estu feliĉa; sed sufiĉas la konformiĝo por ke li estu tre feliĉa.

D' Azéglío.

* * *

La malfeliĉo reliefigas iajn virtojn, same kiel la nokto trembriligas la stelojn.

J. Claretie.

* * *

El ĉio, kio ekzistas, ĉu videbla, ĉu nevidebla, mi kredas nur je la Amo, tio estas, je tio nekredebla.

Campoamor.

* * *

La viro amas supraĵe kaj tre ofte; kaj la virino amas profunde kaj malofte.

Anonimulo.

* * *

Kiam io nova ilin allogas, kaj la scivolemo ilin puŝas, la virinoj iras malproksimen.

A. Ricard.

* * *

La trankvileco de l' animo estas io bonega. Bedaŭrinde, ĝi estas juvelo tiel delikata kiel altvalora kaj malofta.

Goethe.

Laŭ portugala traduko esperantigis M. A. S.

LA SONGO

EL LA UKRAINA lingvo

Ivan Kotljarevskij (1769a-1838a j.)

*L' afliktojn, songo, ni forgesas
ĉe l' tus' de ĉia milda sin';
feliĉon novan ci promesas
kaj per espero lulas nin.*

*Sen ŝuld' puniton ci konsolas,
pri l' ŝuld' al la krimul' parolas
per bildoj kaj per emoci';
ci la lacitojn refortigas,
l' amantojn verajn ci kunigas;
veindas, kiun fuĝas ci!*

(Esperantigis F. V. Lorenz)

RETROVO

SYLLA CHAVES

*Min venkis la amo. Fariĝis mi sklavo
De viaj brilpuraj okuloj;
Kaj poste min vundis korpika la glavo:
— Vi devis foriri al foraj insultoj.*

*Forpasis la jaroj, blovitaj de l' vento,
Sed ĝi ne detruis pri vi la memoron,
Kaj restis l' amsento,
Ĉar mi kaŝis ĝin en la koron.*

*De tiam mi serĉas tra l' mondo la astron
Brilantan en reĉa ĉiel',
Simile al hundo serĉanta la mastron,
Aŭ floron serĉanta l' abel'.
Serĉadis tra l' plena de floroj ĝardeno,
Kaj diris al rozo, violo, jasmeno:
— Ĉu vidis vi ŝiajn okulojn fidelajn
Kaj lipojn mielajn?*

*Hodiaŭ mi fine denove vin vidas,
Denove amplene je kis' mi avidas;
Sed en viaj lipoj flariĝas aromo...
— Ĉu vi min perfidas? —
... De iu alia virkomo...*

*Ho ve! Mia brusto fariĝis dezerta...
Kaj kiun mi venis renkonti? Ĉu vin?
Ververe vi estas ĉe pli malproksime
Ol antaŭ la trovo, ho perfidulin'!*

Pri "Língua Geral"

Heroldo de Esperanto enhavas en sia numero 12, sub la rubriko "Ekzameni vin mem", la jenan demandon: 77. Kiu konstruita lingvo estis enkondukita de religuloj, por pli facile interkompreni kun indiĝenoj? — En la sekvonta numero (13), aperis la jena respondo: 77. "Língua Geral", en la 16-a jarcento enkondukita de jezuitoj en Suda-merikon.

Pri tio, oni permesu al mi fari kontraŭparolon.

"Língua Geral" ne estas "konstruita, sed natura indiĝena lingvo, kiun uzis la indiĝenoj kiuj vivis marbore en Brazilo, preskaŭ de l' sudo ĝis la nordo. Nuntempe etnografie la lingvo havas la nomon "Tupy". La jezuitoj ellernis ĝin kiam ili alvenis, kaj uzis ĝin tia, kia ĝi estis. Nature, estis necese krei kelkajn neologismojn por esprimi religiajn ideojn ankoraŭ nekonatajn tie. Sed, tiuj neologismoj estis preskaŭ ĉiam ideesprimaj kunmetaĵoj el vortoj kiuj jam antaŭe ekzistis en la indiĝena lingvo. La lingvo "Tupy" tiatempe dividigis en pluraj, ne multe diferencaj dialektoj. La jezuitoj studis precipe unu, kaj faris ĝin ĝenerala lingvo (Língua Geral). La unuan gramatikon publikigis la jezuito p-e José de Anchieta (Arte de Gramática da Língua mais uzada na costa do Brasil. Coimbra, 1595). Anchieta estis tiatempe inter la indiĝenoj en Piratininga (hodiaŭ la granda urbo São Paulo).

Alia jezuito (p-e Luiz Figueira), iom pli malfrue publikigis similan gramatikon. Li estis inter la indiĝenoj en Maranhão, do sufiĉe malproksime. Sed la gramatiko nur diferencas en kelkaj detaloj.

En São Paulo, ekzistas aktuale, sed jam de antaŭ pluraj jaroj, en la filozofia fakultato de la universitato, speciala profesoro (p-ro d-ro Plínio Ayres) por instrui pri ĝi kaj pri "Tupinologio". Kiu deziras pluajn informojn, povas direkti sin al li, al d-ro Egon Schaden, (fakdelegito pri etnologio), São Paulo, Caixa Postal 5459; aŭ al mi: Francisco S. G. Schaden, São Bonifácio, Correio de Queçaba, Santa Catarina, Brasil.

PROLARS. A.

Rua 7 de Setembro, 99

RIO DE JANEIRO

Tra La Mondo

SVEDUJO. Je la 7a de Septembro, okazis la tria dan-sveda esperantotago, en Hålsingborg. Pli ol cent danaj gesamideanoj, multaj el Yutlando, ĉeestis la belegan feston. La solena akcepto okazis en la urbo-domo. Bonvene paroladis la prezidanto de la Esp. Klubo de Hålsingborg, s-ano Enoek Nilsson.

* * *

La sveda parlamento sendiskute aprobis la propono de la Gobierno, kiu petis 5.000 (kvin mil) svedajn kronojn por enkonduki specialan kurson por profesoroj, kiuj instruos Esperanton al la lernantaro.

* * *

Hungarujo. La urbestro de Budapeŝto decidis oficiale enkonduki Esperanton en la mezajn kaj ĝeneralajn lernejojn, por la jaroj 1947-48. Tiaĉe, li malfermigis kursojn por la profesoroj kiuj plenumos la taskon instrui la junularon.

* * *

En Budapeŝto, kunfandiĝis la "Hungara Esperanto Societo" (neŭtrala) kun la "Hungarlanda Esperanto Societo Laborista", sub la nova titolo: "Hungarlanda Esperanto Societo". Ĝia prezidanto estas la konata esp. verkisto s-ano Julio Baghy.

Nov-Zelando. Ĉi jare, okazis la 12a Esp. Kongreso, post 6 jara silentado.

Germanujo. En Frankfort, kunvenis delegitoj de 33 Ligoj kaj Grupoj de 3 el la okupataj zonoj. Oni decidis restarigi la malnovan "Germana Asocio de Esperantistoj"-n, neŭtralan kaj laboristan. La Asocio estas antifaŝista, sed neŭtrala pri religio, politiko kaj rasdeveno.

Niaj Perantoj

Belo Horizonte — DR. L. DE AZEREDO COUTINHO, Rua Carijós, 218 - 2.º andar - Sala 26.
 Foz do Iguaçu — CARLOS H. DIONISIO.
 Salvador — EDGARD DA SILVA ESTRELA, Rua 3 de Maio, 12.
 São Paulo — VICTOR MINIERO, Rua Comandante Salgado, 234.
 Porto Alegre — ARY ZAMORA, Rua S. Carlos, 1192
 Uberlândia — HAROLDO LEITE PINTO, Caixa Postal, 337.

Aliaj gesamideanoj, kiuj deziras reprezenti "RIO ESPERANTISTA"-N en aliaj urboj, bonvole skribu al la redakcio.

RICEVITAJ PUBLIKAĴOJ

O Julinho; kun Esp. fako. N.º 2. Porto Alegre, Brazilo.

La Folio, n.º 7. Malmo, Svedujo.

Laborista Esperantisto, n.º 10. Amsterdamo, Nederlando.

Renovigo, n.º 88. Meksiko.

Boletim Espirita, n.º 17. Florianópolis, Brazilo.

Suda Stelo, n.º 3. Porto Alegre, Brazilo.

S. Paulo Esperantista, n.º 4. S. Paulo, Brazilo.

* * *

Inter la interŝanĝekzempleroj, ni ricevis la unuan fojon "La Juna Vivo"-n, kaj "Malgranda Revuo"-n. La unua, organo por la junularo, instruistoj, kaj amikoj de la junularo. Malgranda 16 paĝa formato, bonega esp. stilo, kun instruaj tekstoj precipe por la junularo. Inda legaĵo por ĉiuj. Aparte, ni informas pri aboneblecoj.

La dua, malgranda 32 paĝa formato, aperas kvaronjare. Bonega literaturo, poemoj, artikoloj interesplenaj en korekta Esperanto. Laŭŝajne, en Brazilo, ĝi ankoraŭ ne havas peranton, tial ni sciigas la aboneblecon: Jarabono, 4 kronojn svedajn. Unuopan ekzempleron al eksterlando oni sendas kontraŭ 3 rp. kup. — Adreso: S. Engholm, Skolyatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirkonto 268023.

"Rio Esperantista" deziras daŭran interŝanĝon al ambaŭ revuetoj, tiom valoraj al nia internacia movado.

RIO-ESPERANTISTA
 Propriedade da A.E.R.J.
 Um jornal do Rio para o mundo

Redação e administração:
R. das Marrecas, 19 - 2.º and.
 Tel. 22-5300 — C. Postal 3677
 Rio de Janeiro — BRASIL

Diretor responsável
Nelson Pereira de Souza
 Gerente
Delio Pereira de Souza
 Redator-chefe
Lászlo Zinner
 Redatores
Manuel Aveleza de Souza
Dr. Braz Cosenza
 Auxiliares
Othon Crespo Nunes
José Cosenza

*

EXPEDIENTE:

As importâncias referentes as assinaturas de RIO-ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente, Delio Pereira de Souza, bem como, quaisquer quantias, Vales-Postais, cheques, etc.

Este jornal dá ampla liberdade aos seus colaboradores, não se responsabilizando pelos conceitos emitidos em artigos assinados e implicitamente nas seções que tenham redatores responsáveis.

Organizaĵo je servo de la UNIVERSALA FRATECO

La gazeto rajtigas tutan liberon al siaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondecas por la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj kaj sekve, por la fakoj, kiuj havas respondecajn redaktorojn.

Estas permesata la represigo, ĉu parte, ĉu tute, de la artikoloj, kondiĉe ke oni citu

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas

SO' NO

O CAMIZEIRO



LA UNUAJ ĜAFINOJ

(Lau argentina verkisto Estanislao Zeballos)

La Plata-Rivero ŝuldas al Peruo siajn ŝafarojn. La eltrovintoj de niaj grandaj riveroj, Solis kaj Kaboto, ne alportis ŝafinojn en iliaj ŝipoj, kiam Pedro de Mendoza sekvis ilin, ekipante la plej riĉan k potencan el ĉiuj ŝiparoj tiam senditaj al la maroj de Ameriko, li enŝipigis nur ĉevalojn k ĉevalinojn, kiel milit elementojn. Je la kapitulacio de Alvar Nuñez Cabeza de Vaca, la 10an de Marto 1540, renoviĝas la devigo enporti ĉevalojn, ne parolante pri ŝafinoj. Tiuj ĉi venis hazarde. Martinez de Irala, kiu estis firmiginta la kolonion de la Plata-Rivero, organizis korpuson el Kastiloj, kun tri mil helpantaj indianoj, por malfermi la vojon al Peruo. La ekspediciuloj eliris el Paragvaĵo, tra iris la nekonatan vastegan regionon de Ĉako, la ĵunglojn, la montarojn k la tribojn inter Paragvaĵo k Peruo, venkante per granda peno malfacilaĵojn, antaŭ kiuj eĉ hodiaŭ dezistas, malkuraĝintaj, la plej bone preparitaj ekspedicioj, kun rimedoj k elementoj ne songitaj dum la XV jarcento.

La Gazca (komisiito de la reĝo bravajn kapitanojn de la Plata-Rivero, k sendis ilin al Asuncio, en Peruo) regalis malavare la Iliaj ĉefoj Nufllo Chaveš, Miguel de Rutfa k Rui Garcia ricevis etan ŝafaron k kaprareton el Kuzko, kiujn ili decidis enkonduki en la Plata-Riveron (regiono aktuale tiel nomita Argentino), batalante kontraŭ grandegaj malfacilaĵoj dum la marŝado tra tiu terurega dezerto. Rui Diaz de Guzman rakontas, ke ili batalis multfoke, triumfe, kontraŭ la indianoj, laŭlonge de la vojo.

Tiu nekton, li aldonas, tridek mil sovaĝuloj kuniĝintaj alproksimiĝis por fali neatendite sur la bivakon de Nufllo (Njufllo) Chavez (Ĉavez), sed ekaŭdante la blekadon de la ŝafoj k kaproj, k ĉar ili ne konis tiajn bestojn, ili kredis ke tiuj sonoj estis alarm-anoncoj de la deĵorantoj, k ili foriris, montriĝante malprok sime la sekvontan matenon. Tiu kolekto alvenis en 1549 al Asuncio.

Samtempe komencis la konkeraĵo de Tukuman, rotestro Johano Nuñez (Nunjez) del Prado, permesita k armita de La Gazca, post lia venko super Pizarro. Tiu ĉi ekspedicio en-

kondukis en Tukuman, en 1550 ŝafaron devenan de Chichas (Ĉiĉas), Advokato Johano Torres Cera y Aragon, en 1587, enportis el Peruo kvarmil geŝafojn kune kun okmil kvincent brutojn de aliaj specoj.

Nuntempa verkisto estas dirinta:

"Tiu enkonduko de bestoj, tre valoraj tiampe, estis tio, kio vere levis la koloson de prospero de tiu-ĉi lando".

Ĉiuj ili estis disdonitaj inter la provincoj Buenos Aires, Santa Fe k Corrientes.

Esperantigis E. H. Garrote
(Argentino)

La Simio Kaj La Okulvitroj

EL LA RUSA LINGO

Ivan Krylov (1768a - 1844a j.)

*Simi' maljuna malfortiĝis je la vido,
sed ekmemoris, kun konfido,
ke uz' de okulvitroj — laŭ la homaj vortoj —
utilas eĉ l' okulmalfortoj.
Ses okulvitrojn li havigis kun rapido;
li turnas ilin iel, ĉiel,
kaj al la kaposupro, al la vosto metas,
jen ilin flaras, jen leketas:
kaj tamen la efik' aperas ja neniel!*

*Ekkriis la simio: "Fi! jen la rezulto
de l' kredo je la homa stulto!
La okulvitrojn oni laŭdis multfoje,
sed ili al mi ne utilis."
Kaj la simio, kolerante kaj malĝoje,
ŝtonbatis ilin tuj, survoje,
ke nur pecetoj ektrebrilis.*

*Ĉe l' homoj oni ankaŭ trovas tian moron:
de aj' utila se ne konas la valoron
la nesciulo, traktas ĝin kun malinklin';
kaj se li ĝuas ja honoron,
li eĉ ekpersekutas ĝin.*

(Esperantigis Francisco V. Lorenz)

SEMINARIO POR ESPERANTISTAJ GEINSTRUISTOJ EN FRANCUJO

En "Regiona Centro de Popola Edukado" okazis, de la 25a de Aŭgusto ĝis la 14a de Septembro 1947, unufoje en nia lando, "Provttempo" de esperantistaj geinstruistoj, organizita de G. E. E. (nia enlanda asocio de Esperanto-instruistoj), kun permeso de la ministerio (por Junularo, Arto kaj Popola Edukado). La celo estis instrui pri la pedagogio de Esperanto, ne nur teorie, sed ankaŭ praktike. Prelegoj, lekcioj kaj lecionoj al infanoj okazas ĉiutage, kvazaŭ en iu ordinara porinstruista seminario. La partoprenantoj perfektiĝas en Esperanto, ili ellernas la lingvon, kaj ĉeestas dum iu kolego instruas al 11-14 jaraj infanoj. Tiel ili ricevas la kuraĝon por siavice roli kiel instruantoj. La kritiko de la kolegoj kaj gvidantoj estas utila al ĉiuj.

Ni esperas restarigi similan seminaron ĉiuseme, por ke baldaŭ estu en la tuta lando areda lertaj gvidantoj instruantaj Esperanton en siaj lernejoj.

(El Juna Vivo)
J. Dedieu, 3 rue Arzac,
Toulouse.

INTERNACIA ASOCIO DE POSTMARK-KOLEKTANTOJ

La I. A. P. K. deziras re prezentanton por nia urbo kaj aliaj de nia lando. Ĝi jam havas reprezentantojn en la urboj Tanabi, S-ro S. A. Oliveira, kaj Livramento, S-ro M. B. dos Santos. La akceptonto skribu al la Centra Oficejo: XP10 House, Didcot, Berks., Inglaterra, kaj samtempe al samideano D. Pereira de Souza, Caixa Postal 3677, Delegito de U. E. A., kiu prizorgas la aferon.

A. S. REZENDE

— Inĝeniero —

projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj
luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj
aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca,
— angla kaj Esperanta —

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro

Brazilo

Agência São Jorge

(Agentejo Sankta Georgo)

Biletoj por vojaĝoj surmaraj, surteraj kaj aeraj

TURISMO

IMPORTADO KAJ EKSPORTADO

JORGE SOARES & CIA. LTDA.

PRAÇA MAUA' N.º 67 — RIO DE JANEIRO, BRAZILLO
(ĉe la havenkajo)

LIVROS EM ESPERANTO

Fako por librovendado de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro:

| | Cr\$ |
|---|-------|
| Primeiro Manual de Esperanto | 3,00 |
| Vida, Idéias, Lógica e Obra de Zamenhof | 2,00 |
| Essência e Futuro da Idéia de Língua Internacional, em português | 6,00 |
| A mesma obra, em português e esperanto | 8,00 |
| Esperanto Sem Mestre, enc. | 16,00 |
| Método de Esperanto, cart. | 9,00 |
| Guia de Conversação, broch. | 5,00 |
| Esperanto Modelo, broch. | 15,00 |
| La Perfido, de Jong | 25,00 |
| La Hispana Tragedio, de Last | 25,00 |
| Kulio, de Szekely | 25,00 |
| Judoj sen Mono, de Gold | 25,00 |
| Patroj kaj Filoj, de Turgenjev | 25,00 |
| Rigardante Malantaŭen, de Bellamy | 20,00 |
| Romano pri Afrika Bieno, de Schreiner | 18,00 |
| Fabeloj, de Anderson, 2 ^a 3 ^a partoj | 30,00 |
| La Fino, de Bernadotte | 15,00 |
| Baha'u'llah kaj la Nova Epoko | 12,00 |
| Parizaj Paroladoj de Abdul Baha | 10,00 |
| Glumarko kun portreto de Zamenhof, trideko | 3,00 |
| " Esperanto lingvo internacia, cento | 6,00 |
| " Oni korespondas Esperante, cento | 6,00 |
| " Stelo traĵeto de la vorto "Esperanto", cento | 6,00 |
| Poŝtkartoj kun verda stelo, deko | 5,00 |
| Leterkartoj kun verda stelo, deko | 5,00 |
| Leterpapero kun verda stelo, cento | 18,00 |
| Kovertoj kun la verda stelo, cento | 18,00 |

Os samideanos do interior não precisam remeter dinheiro, podem fazer os seus pedidos por meio de cartão postal, recebendo no correio pelo serviço de Reembolso Postal. Os cheques ou vales postais devem vir em nome do Tesoureiro, sr. Manoel Barbosa de Mello, Caixa Postal 3677, Rio de Janeiro.

SUBTENANTOJ

RIO ESPERANTISTA kaj la Asocio tre dankas al la esperantistoj, kiuj tutkore kaj propravole fariĝis subtenantoj, ĝis kiam la gazeto havos sufiĉe da reklamoj por la eldonaj elspezoj. Ili estas: Wilton Ribeiro, Helio Miranda, Othon Crespo Nunes, Florestan Nogueira, Cap. J. F. Lima, F-ino Palmyra M. Vasconcellos, Jozefo Joels, Nelson de Souza, D-ro Alcides N. R. de Castro, Paulo Gomes de Faro, Rylton de L. Rocha, Prof. Roberto das Neves, Manuel Aveleza de Souza, M. Barbosa de Mello, F-ino Rosa Lifchitz, Sylla M. Chaves, A. S. Varão, F-ino Yolanda de Araujo, Jayme B. de Araujo, D-ro Braz Cosenza, C. N. Baschicoff, O. Vianua Peixoto, D. Pereira de Souza, F-ino Elza T. Faria, José Cosenza, O. S. Lopes, Olivio C. Pinto, F. Doblás Filho, kaj Laszlo Zinner.

FOGÃO A ÓLEO "POPULAR"

Sem torcida — Garantido — Desmontável. — Vendas na Fábrica. — Demonstramos sem compromisso. — Preço popular — à vista — atacado — prestação sem entrada
LUZARTE FABRICA LTDA. — Av. Pres. Vargas, 917, 1.º

GEESPERANTISTOJ!

Donu preferon al

GRÁFICA RIO

Rua General Pedra, 339-A
Presajoj ĝeneralaj. Perfekteco kaj rapideco.

Cerpajoj el malnovaj esperantaj gazetoj

"En ideala societo ĉiu ano havas sian difinitan, specialan taskon. Tiom ĝenerale preciza estas la kunsento en la respondoj, ke ĝia signifo ne povas esti flankelasisita. Grava estas tiu eco de nia societo. Ĝi ne estas nova elkreskaĵo. Ĝi ne estas kaŭzata de klimato aŭ raso. De la komenco, kaj nun dum preskaŭ dudek jaroj, tiu eco karakterizas nian movadon. En kia ajn lando, nia movado disvastiĝas, oni rekonas en ĝi tiun distingajon: sistema, organizita, persona servado..." ("Europa Kristana Celado" 1908, Sep. Okt.).

* * *

Bohemaj proverboj laŭ traduko de d-ro Ant. Volkmann, Pilsen:

Tia homo, kia amiko.
Malnova peko faras novan honton.
Feliĉon amikoj sekvas.
Koloro malbona konsilisto.
Koron oni ekkonas laŭ koloro.
Antaŭ mensogulo ne mensogu, antaŭ ŝtelisto ne ŝtelu.
Oron oni ekzamenas per fajro.
Kiu semas venton, rikoltas ventegon.

Sen laboro ne estas kukoj.
Pli bone saĝa malamiko, ol malsaĝa amiko.
Saneco super ĉio.
Kion oni timas tion oni kredas.
Ne estas konsilinde kun grandaj sinjoroj ĉerizojn manĝi.
Sub maldelikata ŝelo estas dolĉa kerno.

Kion ne lernis Johaneto, Johano jam ne lernas.
Ĉiu kanto havas finon. ("Brazila Esperantisto", 1911, Majo-Junio).

ESOPO

Esopo iris iam al malgranda urbo. Sur la vojo, li renkontis iun vojiranton, kiu salutis lin kaj demandis: — Kiom da tempo mi devas ankoraŭ iri, ĝis mi

atingos tiun vilaĝeton, kiun ni vidas tie?

— Marŝu, respondis Esopo.
— Tion mi scias, rediris la vojaĝanto, ke mi devas marŝi; sed diru: kiom da tempo mi bezonas por alveni al tiu vilaĝo?
— Marŝu! denove diris Esopo.
— "Tiu viro estas freneza, ekpensis la vojaĝanto; neutile estas demandi lin plue"; kaj li daŭrigis sian vojon.

Sed tuj Esopo vokis al li:
— Nu, haltu! Vi estos tie post du horoj!

La fremdulo venis returne al Esopo kaj petis:

— Kiel vi scias tion nun kaj ne volis paroli pli frue?

Sed Esopo respondis:
— Ĉu mi povis diri ĝin, antaŭ ol vidi, kiel rapide vi marŝas?

(El la greka esperantigis P. Fruictier.

"Normanda Stelo", Mardo, 1912.)

* * *

Rio de Janeiro — Paris.

La unuan de Aprilo, okazis inter du ministroj de poŝto, franca kaj brazila, la unua senfadena parolado. La unua parolis france kaj la dua brazile, kion la brazila ambasadoro tradukis francen. La 3an de Aprilo, dank' al la ĝentileco de "Companhia Radiotelegraphica Brasileira", s-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de "Brazila Ligo Esperantista", en Rio de Janeiro, interparolis kun s-ro Emile Houbart, direktoro de "La Movado", en Paris, kaj reciproke salutis unu la alian en la nomo de siaj samlandaj samideanoj — la unuan fojon per senfadena telefono — en Esperanto.

La ambaŭlandaj gazetaroj raportis pri tio.

("Aŭstria Esperantisto", 1930. Aŭg.-Sept.)

MODAS



Glamour

M. KULICK

RUA GONÇALVES DIAS, 40 - Loja 21 - Tel. 42-5293
GALERIA dos EMPREGADOS NO COMÉRCIO

Obra primorosa

BIBLIOTECA ESPECIALIZADA

Seção de Livros

Os adjetivos com que se possa dizer quanto às edições esperantistas de famosas obras, nacionais e de outras pátrias, são, verdadeiramente aquém da realidade e, mais uma vez o Espírito sente quão pobre é a linguagem humana, quando é preciso frizar um pensamento justo.

Idéia assim sempre nos ocorre, principalmente no momento em que temos de salientar o recebimento de um régio presente, qual acaba de nos ofertar o "samideano" sr. prof. Ismael Gomes Braga — pela Federação Espírita Brasileira.

Aos numerosos e relevantes serviços que a livraria editora da FEB tem prestado à causa esperantista, por que todos nós trabalhamos sem esmorecimentos; ao apóio decisivo que tem dado as administrações da "Casa Mater do Espiritismo no Brasil"; aos auxílios incontáveis, de diversos modos, que a "Casa de Ismael" oferta gentilmente ao "movado" houve por bem juntar mais este (a que nos referimos neste agradecimento): Depois da "Enkonduko", em seguida à outra edição-complementar ("La Libro de l' Spiritoj"), aliás o primeiro livro da Doutrina dos Espíritos, que foram muito bem apreciadas pela crítica internacional esperantista, principalmente sobre o Esperanto ("Heroldo de Esperanto kaj Esperanto Internacia"), agora publicado, no idioma internacional-auxiliar-neutro, a segunda obra do Espiritismo — "O Evangelho Segundo o Espiritismo".

A Biblioteca Esperantista, que já possui em suas múltiplas estantes: "La Sankta Biblio" As Sagradas Escrituras (também por livro em separado, como, exemplificadamente, O Novo Testamento, etc.), e outras obras de outras religiões, filosofias, etc., tanto quanto, ainda por exemplo: A Viúva, de José de Alencar; Antônio e Cleópatra, de Shakespeare; Romeu e Julieta, (idem); O Inferno, de Dante; História de Cristo, de G. Papini; Vida de N. S. Jesus Cristo, de Charles Dickens; Bhagavad-Gitá e seria fastidioso citar todas as obras de fama internacional já publicadas na língua-criação do sábio polonês, de saudosíssima memória, sr. dr. Lázaro Luiz Zamenhof, — a referida Biblioteca, conforme dizíamos, enriquece-se ao receber em seu seio, lado a lado com as obras evangélicas ou, protestantes, lado a lado com as obras católicas, budistas, mahometanas, literárias e científicas, a que muito irá ser estimada pelos esperantistas que professam o Espiritismo.

De parabéns, pois, encontramos a Federação e o nosso I.G.B.

O. S. Lopes.

GEJUNULOJ!

Aliĝu al Tutmonda Junular-Organizo, kaj abonu ties oficialan organon "Juna Vivo".

Brazila perantino: F-no Maria Angélica de Oliveira. Rua Haddock Lobo, 58, Rio de Janeiro.

Um recadinho para você, leitor!

(Augustus)

Por que você ainda não é esperantista?

Por que você ainda não trabalha para a mais ampla divulgação do idioma internacional-auxiliar-neutro?

Por que você ainda não pensou, seriamente, no valor da linguagem humana, e então, em seguida, procurou ouvir-nos a respeito?

Por quê? Por quê?

Sabe que está perdendo tempo?

Sabe que o mundo se abrirá às suas mãos, assim que você usar a chave que é o Esperanto?

Ainda não sabe?!?!

Já pensou em como resolveria a situação de intercâmbio entre os povos de nações que usam idiomas diferentes?

Você tem um aparelho de rádio-recepção, de ondas curtas? Por que o tem? Por ventura você sabe compreender os diversos idiomas das várias estações radiofônicas do mundo? E se houvessem programas, ao menos noticiários, em todas as estações radiofônicas do mundo, que fôsse por 15 mts., diariamente, em Esperanto e, em sabendo você este idioma — criação do sábio polonês Dr. L. L. Zamenhof — não seria muito bom?

Medite um pouco, leitor amigo, nesta e em outras considerações mais importantes, sobre o assunto e logo após, venha trabalhar ao nosso lado, realizando "pensamento e ação por um mundo melhor"!

Korespondi Deziras

Čechoslovakio. S-ano Rudolf Hons, 25 jara oficisto, deziras korespondi kun brazilanoj, bildkarto, pri ĉio. Adreso: KRPY ĉ. 47 p. Kropáčova Vrutice.

Brazilo. Sino André Fischer, sendas 50 diversajn brazilajn poŝtmarkojn kontraŭ sama kvanto, el via lando. Petas unuan sendon; la respondo estas garantiata pere de "Rio Esp. ista". Adreso: Rua Nascimento Silva, 510 — Ipanema — Brazilo.

F A R I G U
S U B T E N A N T O
D E
"RIO ESPERANTISTA"

Socialaj Notoj

Neusa kaj J. E. da Costa Vargas komunikas ĉiujn samideanojn pri la naskiĝo de sia filino LUÍZA.

Feliĉon al la gepatroj kaj feliĉoplenan longan vivon al la denaska esperantistino!

* * *

Dum la kuranta monato, festas sian naskiĝan datrevenon la jenaj asocioj, kiujn ni kore gratulas:

- 2 — Ondina Lopes de Aquino
 - 3 — Olinto Barbosa Fonseca
 - 4 — Carlos de Figueiredo Rocha
 - 7 — Jozefo Joels
 - 8 — Celso Alves Rosa
 - 9 — Arlete Costa de Souza
 - 12 — Luisa Lopes
 - 17 — Oscarina Onete Ferreira
 - 17 — Eduardo Ferreira de Oliveira
 - 19 — Maria Saraiva
 - 22 — Cecílio Alves de Oliveira
 - 26 — Eduardo Jour Castagna.
- Julita Duarte Mendonça de Carvalho.

Representações e Conta Própria
GETULIO S. ARAUJO
Rua da Alfândega, 79-2.º
Rio de Janeiro
Oni korespondas Esperante

Zamenhofaj Diroj

Post la terura mondmilito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj, Eŭropo atendas... ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan. La sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj. Jen la plej granda malfeliĉo de la homaro!

* * *

Fratoj kreitaj laŭ unu modelo... fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn kapablojn, egalajn idealojn... fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo... — tuj fratoj fariĝis tute fremdaj unuj al aliaj kaj inter ili komenciĝis eterna malpaco.

* * *

La reciproka malpaco inter la homoj neniam ĉesos, ĝis la homoj alkitimiĝos starigi la nomon "homo" pli alten ol la nomon de gento... Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj.

Agu kun alinioj tiel, kiel vi deziras, ke aliuoj agu kun vi.

* * *

Kiam "pri amo al la patrujo" parolos al ni la ŝovnistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas... ĉar en ilia buŝo la sankta vorto "amo" malpuriĝas!

HUGO C. DE ALBERGARIA
Escritório de advocacia
Av. Rio Branco, 114-s. 131

DR. ADOLPHO STAERKE
Livre docente da Universidade do Brasil
Clínica de senhoras
Residência: Consultório:
RUA BELA S. LUIZ, 68 R. ASSEMBLÉIA, 58-1.º
Tel. 48-5892 Tel. 42-3835

Rio Esperantista

Orgão oficial da A E R J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor: Nelson Pereira de Souza

Redator-Chefe: László Zinner

Assinaturas:

Brasil — Cr\$ 15,00

Exterior — Cr\$ 30,00

Out 25 Coupões-resposta

Rio de Janeiro, Novembro de 1947

ANO I — Edição mensal — N.º 8

Redação e administração

R. das Marrecas, 19, 2.º and.

Tel.: 22-5300 — C. P. 3677

Avulso Cr\$ 1,00

greso ne havis aspekton de Esp. Kunveno. La prezidanto devus esti esperantisto, almenaŭ paroli pli pri poresperantaĵoj! Laŭ la parolanto, la Kongreso estis tre agrabla promonado... Oni ekzaltis la naciemon, en portugala lingvo, sed oni ne profitis ĝin por akceli la laboron por la pli-fortigo de la movado en Brazilo. Espereble, la gvidantoj de la XII Kongreso, kiu okazos en Belo Horizonte, en 1949, pripensos la aferon, kaj okazigos veran Brazilan Esperantan Kon-

ASSEMBLÉIA GERAL NA ASSOCIAÇÃO

ELEIÇÃO DO NOVO PRESIDENTE PARA 1948

Está fixada para 19 de Dezembro, às 18 horas, a realização da assembléia geral ordinária para eleição do presidente para o ano social de 1948, que por sua vez elegerá os demais membros da Diretoria, de acôrdo com os artigos 13.º e 7.º dos Estatutos. Tratando-se de assunto que interessa a todo o quadro associativo, esperamos contar com a presença de todos os associados. A votação será encerrada às 20 horas, seguindo-se a apuração imediatamente. Os que não puderem comparecer têm direito a transferir o seu direito de voto a outro associado que estiver quite com a Associação.

Esperanto Venkas

Francoju. Novan Esperanto-diskonon eldonis U. E. F. La disko enhavas sur unu flanko la kanton "Eterna malgajeco", laŭ muziko de Chopin, kantitan de s-ino SAUTREUIL, kaj sur la alia flanko, montmartan kanzonon "Nenio kaj io", de Raymond Schwartz, la plej konata franca humoristo. Adreso: Paris 10, 34 rue de Chabrol.

* * *

"O Julinho", oficiala organo de "Gremio Studenta Júlio de Castilhos", el Porto Alegre, Brazilo, aperigis artikolon pri la kreinto de Esperanto, verkitan de Ivo Sanguinetti. Ilustrante la artikolon, aperas foto de Zamenhof. "O Julinho" aperigos daŭre fakon pri Esperanto.

* * *

En Germanujo, oni malfermis konkurson por verki Tutmondan Antologion pri la Esperanta vivo.

Jen la ĉefaj reguloj:

La verkoj estu originalaj, belstilaj kaj seneraraj, enhavante ne pli ol 1000 (mil) vortoj, nek malpli ol 150 (cent kvindek). Se la verkaĵoj estos akceptitaj, oni publikigos ilin, kun la nomoj de la aŭtoroj. La profito de la entrepreno estos dediĉata al la tutmonda Movado.

Sin turni al: S-ino Yvonne Bruc, Engelbertstr 7, Munchen-Pasing, Germanujo, U.S.A. zono.

NIAJ KULTURKUNVENOJ

Dum la kutimaj kulturkunvenoj de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, gvidataj de s-ano Laszlo Zinner, je la 27a de septembro; kaj 4^a, 11^a kaj 18^a de Oktobro, okazis la jenaj laŭtleĝoj kaj paroladoj:

S-ano Octaviano da Silva Lopes, pri la XI Brazila Kongreso faris longan raporton al tiuj, kiuj ne ĉeestis ĝin. S-ano Doblas Filho oficiale paroladis pri la Kongreso al la anaro. S-ano Délio Pereira de Souza, pri la Berna Mondkongreso (Svisujo) faris detalan raporton, kiun la ĉeestantoj aŭskultadis kun granda intereso. S-ano Laszlo Zinner, pri la Esp. Movado kaj influo de religioj. S-ano Roberto das Neves paroladis pri "Sannacieca Asocio Tutmonda", kies ĉefesperanto en Brazilo li estas. S-ano Silla Chaves deklamis "Esperanto-n", de Castro Alves, ricevita de mediano.

S-ano Wilton Ribeiro laŭtleĝis sian verkon titolitan "La Princeso de la Poetoj". Temas pri la vivo de la famkonata portugala poeto Luís de Camões. La verko de s-ano Ribeiro estas kvazaŭ malgranda biografio pri la vivo de tiu granda portugalo.

S-ano José Coenza, nia kortuŝa parolanto, faris interesan paroladeton pri la Alkoholo-malamiko de la Homaro. S-ano Saraiva Varão, nova direktoro de la propagando-fako de la Asocio, paroladis pri la XI Brazila Kongreso. Laŭ lia oponio, la Kon-

greson. Tamen, laŭ la parolanto, oni povis profiti multon el la Kongreso: La interkonatiĝo de la brazilaj geesperantistoj; la vojaĝo, dum kiu oni faris propagandon en la vagonaro; ankaŭ grava okazintaĵo estas la refondigo de "Suda Stelaro", en Campinas, Stato S. Paulo. Laŭ li, ankaŭ estis belega la festo de la inaŭguro de la strato "Esperanto".

S-ano José Cosenza deklamis "La Kapeleto"-n. S-ano Viana Peixoto raportis pri la fondo de "Grupo Esperantista de Niterói". S-ano Roberto das Neves paroladis pri la netaŭgeco de neŭtraleco, kaj la nepre bezono kunlabori kun Sennacieca Asocio Tutmonda. Lia parolado provokis interŝanĝon de diversaj ideoj, favoraj kaj kontraŭaj.

S-ano Délio P. de Souza laŭtleĝis la poemon de Zamenhof, "Al la Fratoj". S-ano O. S. Lopes laŭtleĝis leteron ricevitan el Nederlando, raportantan pri la ticia Movado. S-ano Jozefo Joels anoncis la baldaŭan formiĝon de nova "Moviĝado" esperantista, nome "Nova Vojo".

La proksima kulturkunveno okazos en la proksima sabato, 1^a de Novembro.

*

Ni do invitas vin ĉeesti niajn kulturkunvenojn, kiuj okazos ĉiam sabatvespere, je la kvara kaj duono. Rua das Marrecas, 19, dua etaĝo. Lapa.

Havigu reklamojn kaj abonantojn por la plibonigo de via gazeto:

"RIO ESPERANTISTA"